

Esperanto en servo de la monda paco



P A C O

Oficiala organo de Mondpaca Esperantista Movado (MEM)



1
80

LA MENSOGO DE LA JARCENTO

Prof. Gerhard Kade (FRG)

Oni povas diri, ke la legendo pri „minaco de Oriento“ transformiĝis en la mensogon de la jarcento. Malgraŭ aŭ eble ĝuste pro la progreso en la redukto de la tensio en la politika sfero, ĝi ludas plu sian negativan rolon en la batalo por limigo de la vetarmado kaj por konkretaj paŝoj survoje al ĝenerala kaj kompleta malarmado.

La mensogo pri sovetia minaco obstine ripetiĝas kaj multaj homoj en Okcidento fidis al ĝi malgraŭ la multflankaj klopodoj, inkluzive ankaŭ de militekspertoj malkovri la absurdecon de tiu legendo kaj prezenti ĝin tia, kia efektive ĝi estas — rimedo por misinformado kaj instrumento de la psikologia milito. Tiu legendo regule aperas konekse kun diskutado kaj voĉdonado de militbuĝetojn niaj parlamentoj. Pli ol kvin jarojn ĝi ĵetas ombbron sur la intertraktadojn en Vieno por redukto de la armeoj kaj la armilaro en Centra Eŭropo, uzata estis dum la intertraktadoj SALT-2 por malebligi ties progreson, oni uzas ĝin ankaŭ nun dum la diskutado pri ratifiko.

Ankaŭ la debatoj pri produktado de neŭtronarmiloj kaj ties deponado en Okcidenta Eŭropo montris, ke la legendo pri „minaco de Oriento“ ekludas sian rolon ĝuste tiam, kiam necesas konvinki la sociularon pri nova sistemo de amasmurda armilaro. Estas klare, ke krom la politikistoj kaj la militstrategio antaŭ ĉiuj la armilkonzernoj havas intereson, ke tiu legendo reviviĝu de tempo al tempo.

Estas fakto, ke la mensogo pri „minaco de Oriento“ en ties hodiaŭa formo aperis en periodo, kiam la militsupereco de la NATO-landoj likvidiĝis. Sed la demando mem havas pli longan historion. Ĝi senpere ligiĝas kun la apero de la unua socialisma ŝtato. Usona publicisto kaj specialisto pri politikaj sciencoj Metjuz* skribis en sia libro „La inversa flanko de Usono: . . . jam delonge ekzistas paradoksa situacio de milito, kiun oni ne estigas per pulvo. Jam baldaŭ post la Oktobra revolucio Usono komencis „malvarman militon“ kontraŭ Rusio. Tiu ĉi milito komenciĝis per sanga invado en rusan teritorion. . . Post la malvenko de la Antantaj fortoj en 1921 tiu milito transformiĝis en „malvarman“. Nur en la tridekaj jaroj per diplomatia rekono de Sovetunio tiu antirusa kampanjo kvietiĝis. Se ni esceptus iujn latinamerikajn respublikojn kiaj Brazilo kaj Kolumbio Usono estis la lasta lando rekoninta So-

vetunion. Do oni povas diri, ke la „malvarma milito“ komenciĝis en 1918, respektive en 1921. . .

Kiam estas komencota nova rondo de vetarmado tuj oni lanĉas la formulon pri „sovetia supereco“. Sed ĉar la „pruvoj“ pri tio havas limigitan efikon kaj la trudo de la formulo „supereco — minaco“ estiĝas ĉiam pli diafana, la ĉefaj ideologoj de la agresema NATO-politiko komencis levi al pli alta nivelo la legendon pri „minaco de Oriento“: kun kompletaj detaloj oni priskribas trian mondmiliton. La libro de belga generalo Klos „Eŭropo sen defendo? 48 horoj ŝanĝantaj la vizaĝon de la mondo“ kaj la libro de Heket „La tria mondmilito“ aperis en FRG en la fino de 1977 kaj la komenco de 1978 kaj samtempe sciencistoj serioze prilaborantaj la demandojn de la paco, elmetas tezon de „neevitebleco“ de nova mondmilito. La propagando-direkto tie ĉi facile distingeblas:

— Tezo pri la minaco: en 48 horoj la rusoj aperas ĉe Rejno. . .

— Klare devas videbliĝi la manko de sekureco. . .

Ankaŭ aliaj amasinformiloj komencis tiun temon. Cetere ne surprizende, ke ĝuste dum la lastaj jaroj, post la Fina Akto de Helsinki oni funkciigas ankoraŭ pli aktive la diversajn instrumentojn de la psikologia milito. La kampanjo pri protekto de la homaj rajtoj kaj la mensogo pri la „minaco de Oriento“ (denove en pli ĝenerala, ne nur milita varianto) prezentas ĉeflinion de la atako. La pliakrigo de la psikologia milito tuj post Helsinki disvolviĝas laŭ skemo klare formuliĝita de Gerharo Vetig el la Federacia Instituto pri Internaciaj kaj Orienteŭropaj Pristudoj:

„ . . . ju malpli da solvoj (en la politika batalo — noto de la red.) oni serĉas per la rimedoj por politika trudo kaj uzo de militforto, des pli graviĝas la aktiveco — kiu kaj kiagrade sukcesos influi al la konscio de grandaj homgrupoj“.

Laŭ la neceso la legendo pri la pseŭdominaco de Oriento ŝanĝas siajn konkretajn formojn. Foje ĝi aperas en kostumo de militteĥnika supereco, alfoje en aserto pri sovetiaj hegemoniaj aspiroj. La maniero laŭ kiu oni manipulas la mensogon pri la „minaco de Oriento“ en la erao de redukto de la streĉeco, la ĉiam novaj provoj por misorientigo de la amasoj tre graviĝas la demandon pri la rolo de konstante ripetiĝantaj asertoj pri tiu pseŭdominaco en la tuteca komplekso de akriĝinta psikologia milito.

* La nomoj estas transskribitaj fonetike

DOKUMENTOJ DE LA MONDPACA KONSILIO

Rezolucio (eltiraĵoj)

La komisiono de la homrajtoj de Monda Pac-konsilio kunvenis en Bazelo, Svisio, la 7an — 8an de majo 1979 ekzameni la raportojn prezentitajn de vidatestantoj pri la malobservoj de la homrajtoj en Gvatemalo kaj Urugvajo.

La komisiono aŭdiskaj ricevis parolajn kaj skribajn atestojn de civitanoj el la du landoj, kaj ankaŭ diversajn aliajn pruvojn: dokumentojn, raportojn, artikolojn publikigitajn en la gazetaroj, fotografiaĵojn kaj ceterajn, kiuj konvinkis la komisionojn pri la vero de la raportoj.

Pri Urugvajo

(. . . .) La diversaj atestoj kaj pruvoj prezentitaj al la Komisiono montras, ke kvin jarojn kaj pli, sub la faŝista diktaturo — (dum tiu tempo la Parlamento estis malfondita, la agado de la sindikatoj, de la politikaj partioj kaj de la student-organizoj estis malpermesitaj) — la justicon administris militistaj tribunaloj kontrolitaj de la Junto de la ĉef-majoroj de la militaj fortoj, la amas-komunikiloj subiĝis al tre strikta cenzuro; la plimulto de la eminentuloj de la politika, kultura, sindikata kaj religia medioj estis malliberigitaj, kaj Urugvajo fariĝis la lando kies procento da politikaj malliberuloj estas la plej granda proporcie al ĝia loĝantaro. (...)

(. . .) Daŭras la malapero de civitanoj. OCOA (organizo por kunordigo de kontraŭrevoluciaj operacioj) kaj aliaj kvazaŭ militaj organizoj, forrabas civitanojn same interne kiel ekstere de la lando. Al la listo de la malaperintoj ni

Deklaracio (resume)

(. . .) La daŭrigo de la vetarmado, kiu atingas treege danĝerajn proporciojn, kreas gravan minacon kontraŭ la monda paco kaj atakas la pozitivan procezon de malstreĉo.

La amasigo kaj pliperfektigo de diversaj armilaj tipoj rapidigas la vetarmadon. La regulado de nova generacio de unuafrapa ICBM kaj de moveblaj bazoj, la regulado de precize gvidotaj municioj, la miniaturado de la nukleaj armiloj kaj la regulado de armiloj kun reduktita eksplodo kaj partigita radiado, la malgrandigo de la diferenco inter nukleaj kaj konvenciaj armiloj, ilustrita, ekzemple, de la reguligo de eksplodigiloj per aera karburado kaj de ebla reguligo de novaj armilaj tipoj por amasa detruo, kiel la armiloj je ŝargitaj partikuloj kaj la organizado de moveblaj fortoj por monda interveno, kaj long-

devas aldoni pliajn enkarcerigojn kaj malaperon de pli ol 350 homoj dum la lastaj tri monatoj. (...)

Pri Gvatemalo

(. . .) Ekde 1966 pli ol 30 000 politikaj murdoj okazis. Spite la multajn promesojn de la registaro de Generalo Romero Lucas Garcia kaj de D-ro Francisco Viamar Kramer enketi pri la respondeculoj de tiuj krimoj kaj puni ilin, ĝis hodiaŭ neniu kazo de viktimo de la faŝistoj estas esplorita. (...)

(. . . .) La plej grave trafitaj sektoroj de la oficiala kaj kvazaŭ militista subpremo estis la organizoj de la laboristoj kaj kamparanoj kaj iliaj gvidantoj kaj advokatoj, ekzemple Maria Lopez Larrade kaj Lopez Balan, sindikatano ĉe Coca-Cola. (...)

(. . .) La anticipe pripensitajn masakrojn de kamparanoj elfaris militaj fortoj speciale trejnita, ekzemple en la haveno Panzos, kie la militan operacon faris tiuj, kiuj estis fosintaj la tombojn de la venontaj viktimoj (viroj, virinoj kaj infanoj) pli ol 24 horojn antaŭ la amasa ekstermado.

Pro la ĉisupre menciitaj faktoj pri la situacio en Urugvajo kaj Gvatemalo, la komisiono de la homaj rajtoj de Monda Pac-konsilio

admonas

(. . .) ke la faktoj prezentitaj al la Komisiono estu konigitaj al la internacia publika opiniantaro kaj al ĉiuj internaciaj organizoj.

tempaj planoj por konstanta kreskado de militaj elspezoj, estas tre maltrankviligaj. Ĉio tio paroksis migas nian konscion pri la urĝeco de la situacio.

Konsiderante tiujn novajn kaj tre maltrankviligajn faktojn, la ritmo de la disvolviĝo de la traktadoj estas prave konsiderata de vastaj sektoroj de la internacia publika opiniantaro kiel ne adaptita.

Tamen, spite tiujn faktojn, kuraĝigas nin gravaj rezultoj. La traktato SALT-II post ratifo, estos ĉefa paŝo en la limigo de la plej danĝeraj amasdetruaj armilaj tipoj, kaj grave kontribuos al plifortigo de la procesoj de sereniĝo kaj malfermos la vojon al novaj akordoj pri limigoj de armado kaj pri malarmado. Depost la kunveno en Vieno de ŝtatestroj de Usono kaj Sovetunio,

ekzistas internacia etoso pli favora kaj novaj politikaj kondiĉoj taŭgaj por bremsi kaj haltigi la militarismon. Pro tio, la internacia politika opiniantaro postulas la ratifon de la traktato. (...)

(. . .) Ni ege bedaŭras la rifuzon de unu el la ŝtatoj posedantaj nuklean armilon — Ĉina Popola Respubliko — sidi ĉe la loko por ĝi destinita en la Malarmkomitato kaj ni arde esperas, ke Ĉinio modifos sian sintenon kaj ekpartoprenos la laborojn de la Komitato. La nuklea armilaro estas la plej granda danĝero por la homaro. Sed ekzistas ankaŭ aliaj amasdetruaj armiloj, kiuj grave minacas la civilizacion. La armiloj nomataj „silentaj“ — la kemiaj armiloj — kiuj estas en la tagordo de la Komitato, estas tre grava demando. Kvankam la demando estis esplorita kaj konkretaj proponoj faritaj, neniun veran progreson al forigo de tiuj abomenaj armiloj ankoraŭ realiĝis. Je tiu grava momento, bonvolo kaj klopodoj devas baldaŭ konkretiĝi per adopto de efika internacia konvencio.

Novaj specoj de amasdetruaj armiloj estas ellaborataj surbaze de gigantaj klopodoj de scienco kaj teknologio. Se antaŭrimedoj ne estus ĝustatempe aplikataj, la monda situacio konsiderinde difektiĝus kaj la finaranĝo de novaj akordoj pri malarmado fariĝus pli malfacila.

Ni ĝojas konstatante, ke grava progreso estas atingita en specifa problemo de tiu kampo; temas pri preparado de traktato malpermesanta la radiologiajn armilojn. Ni apelacias la malarmkomitaton baldaŭ adopti finan tekston kaj prezenti ĝin por aprobo al la Ĝenerala Asembleo de UN.

(. . .) Cele al plilarĝigo kaj plifortigo de la malarma procezo Monda Packonsilio daŭrigos siajn klopodojn por baldaŭ kunvoko de monda Konferenco pri malarmado kun partopreno de ĉiuj ŝtatoj. Ni daŭre senmaskigos tiujn, kiuj subfosas la sereniĝon kaj okazigas novajn paŝojn en la vetarmado.

Monda Packonsilio subtenas la iniciaton de la Ĝenerala Asembleo de UN pri okazigo de ĉiujara internacia semajno (komencanta la 24-an de oktobro) por pli bone konigi la celojn de malarmado kaj dume organizi amasajn farojn en la tuta mondo. La problemoj esploritaj de la malarmkomitato estos la centro de ĉijaraj faradoj.

Al la membroj de malarmkomitato ni deziras plenan sukceson pri ellaborado de solvoj de la ĉefaj taskoj al ili atribuitaj. Monda Packonsilio plejble bone aktivos por kontribui al atingo de fruktodonaj rezultoj, kontribuante organizi popolan subtenon al sereniĝo, malarmado kaj ĉiuj konkretaj akordoj tiucelaj.

La 7-an de julio 1979

Internacia konferenco

kun la palestina popolo por solidareco

Bazel, 4—6. V. 1979

Alvoko

La mondo konstatas gravan kreskadon de la streĉiteco en Proksim-Oriento pro la konstanta malestimo kontraŭ la ne rezigneblaj naciaj rajtoj de la araba popolo de Palestino.

La rifuzo de la naciaj rajtoj al la palestina popolo dum pli ol 30 jaroj ĵetis Proksim-Orienton en kvar militojn, provokis suferojn kaj nedireblajn sang-elverŝojn kaj plurfoje minacis la pacon.

La Unuiĝintaj Nacioj asertis, ke justa solvo de la palestina problemo estas la ŝlosilo por efektiviĝi pacon kaj justecon en Proksim-Oriento. La Ĝenerala Asembleo de UN, en sia rezolucio 3236a tre klare difinis la bazon de justa solvo de la palestina problemo, petante plenan retiriĝon de Israelo el ĉiuj arabaj teritorioj okupitaj ek de 1967, subtenante la rajton de la palestina popolo pri memdecido, inkluzive de la rajto fondi propran ŝtaton sendependan kaj suverenan sen fremda enmiksiĝo kaj de la rajto reveni en sian patrion laŭ la Universala Deklaracio de la homaj rajtoj.

Ĉiu provo, ĉiu akordo cele al solvo de la proksimorienta problemo ekstere de la Unuiĝintaj Nacioj, spite al iliaj rezolucioj kaj dum foresto de PLO*), universale agnoskita kiel nura leĝa reprezentanto de la palestina popolo, ne povus konduki al paco, sed al nova pligravigo de la streĉiteco kaj de la suferoj de la tieaj popoloj.

Ni alvokas ĉiujn popolojn, registarojn, parlamentojn, politikajn partiojn, sindikatojn kaj ĉiujn aliajn organizojn aktive labori por efektiva apliko de la rezolucioj de la Unuiĝintaj Nacioj pri la palestina problemo.

Ni petas al UN uzi ĉiujn rimedojn je sia dispono por senprokraste efektiviĝi ĉiujn ĝiajn rezoluciojn rilate al la palestina problemo, notinde rezolucion 3236an de la Ĝenerala Asembleo.

Ni devo-ligas nin senpaŭze trakonduki kampanjon por mobilizi plejgrandskale la publikan opinionon por la efektivigo de la naciaj nerezigneblaj rajtoj de la palestina popolo — ŝlosilo de la paco en Proksima Oriento.

x) Palestina Liberiga Organizo

INTERNACIA INSTITUTO DE PACO

Kreita laŭ iniciato de sciencaj kaj sociaj organizoj de pluraj landoj la Internacia Instituto de Paco en Vieno estiĝis en la komenco de la 70-aj jaroj aktiva scienca centro. Ĝia tasko estas unuigi la sciencistojn por interŝanĝi opiniojn pri aktualaj politikaj demandoj. Ĝi organizas simpoziojn, kolokvojn, konferencojn, en kiuj ordinare partoprenas 45—60 sciencistoj el 15 —20 landoj. La instituto estiĝis loko por renkontiĝoj kaj kontaktoj inter fakuloj de Oriento kaj Okcidento.

En la internaciaj sciencaj konferencoj kaj simpozioj organizitaj de la instituto en diversaj landoj, kiel same en ties gvidorgano, estas vaste reprezentitaj diversaj tendencoj de la socia penso. Malkaŝa kaj konstrua konversacio de sciencistoj de diversaj ideologiaj konceptoj prezentas plej gravan principon en ĝia laboro. La instituto nun havas kontaktojn kun rondoj de okcidenta sociularo, kiuj antaŭe estis for de la amasa pacmovado. Ĝi havas konstantajn interrilatojn kun multaj naciaj kaj internaciaj organizoj kaj institucioj batalantaj por paco aŭ pristudentaj la problemojn de paco kaj malarmado.

Tiuj interrilatoj ekhavas des pli gravan signifon pro la fakto, ke la relative juna scienca direkto, kiu okupiĝas pri kompleksa pristudentado de problemoj de la paco kaj la milito kaj estas nomata en okcidentaj landoj „scienco pri paco“ rimarkinde disvolviĝis kaj eniris la lastajn jarojn en novajn landojn kaj novajn regionojn de esplorado.

Lastatempe en la simpozioj de la Viena instituto oni diskutas plurajn demandojn de ekskluzive aktuala signifo:

— eblecoj por limigo de la trudo de la milit-industria komplekso kaj la multnaciaj monopoloj;

— vojoj por malpermeso al la armiloj por amas-ekstermado;

— problemoj de transformo de militindustrio sur pacarelojn;

— principa ebleco por efektivigo de senarmila paco en kondiĉoj de ekzistado de du diversaj sociaj sistemoj kaj konekse kun tio — perspektivo por kreo de modelo por malarmado de Eŭropo.

Inter septembro 1977 kaj aprilo 1979 organiziĝis sep internaciaj simpozioj pri gravaj problemoj de nia tempo. La temo de unu el ili okazinta en januaro 1978 en Vieno estis: „Vojoj por efektivigo de tuteca malpermeso al kreo kaj produktado de novaj specoj kaj sistemoj de amas-ekstermaj armiloj“. Oni diskutis la novajn proporciojn en la batalo por malarmado estiĝintajn kun la apero de neŭtronarmiloj kaj flu-

gilhavaj raketoj. La partoprenintoj en la simpozio — sciencistoj de 17 eŭropaj landoj — emfazis la pravecon kaj la ĝustatempecon de la proponoj fare de la prezidanto de la prezidio de la Supera Soveto de USSR Breĵnev al la okcidentaj landoj por kunrezigno pri produktado de neŭtronarmiloj. En la simpozio oni akceptis la „Vienen Alvokon“ al la sciencistaro en Eŭropo subteni politikon de sereniĝo, decide sin deklari kontraŭ produktado de neŭtronarmiloj kaj ties depono en la koro de Eŭropo.

La esplora aktiveco de la Viena Instituto de Paco estas farata de ĝiaj individuaj kaj kolektivaj membroj en ties landoj kaj la rezultoj publikiĝas. Dum la lastaj du jaroj eldoniĝis pluraj monografioj kaj broŝuroj, ĉiu el kiuj traktas apartan regionon en la esplorado de la pacproblemoj. La instituto eldonas revuon „Scienco kaj paco“ (kvarfoje jare en angla kaj germana lingvoj) kaj en ĝi publikiĝas la materialoj de la simpozioj.

La Viena Instituto de Paco ricevas ĉiam pli grandan rekonon en la sociaj rondoj kiel aŭtoritata forumo pri la demandoj de la paco, la malarmado kaj la internacia malstreĉiĝo. La Plenumkomitato de UNESKO en sia 104-a sesio atribuis al ĝi kategorion „B“ (informaj kaj konsultaj rilatoj), kio konfirmas la plikreskintajn rolon kaj signifon de la instituto. La Internacia Instituto de Paco partoprenas en efektivigo de speciala programo de UNESKO en la sfero de pristudoj de la paco. Ĝi aktive kunlaboras al diversaj internaciaj organizaĵoj kaj partoprenas en pluraj grandaj internaciaj konferencoj, inkluzive al tiuj okazigataj en la Monda Konsilio de la Paco. Ekzemple en 1978 delegitaro de IIP partoprenis en la Ĝeneva Konferenco de neregistaraj organizaĵoj pri malarmado kaj en la speciala sesio de la ĝenerala Asembleo de UNO pri la malarmado.

La etapo de rekonado de la Viena instituto kiel scienca-organiza centro de esplorado de la pacproblemoj finiĝis. Komenciĝas nova etapo, novaj eblecoj en la komuna batalo por paco, por kompleta kaj ĝenerala malarmado — bazaj taskoj de la nuntempo.

STRANGE!

GRANDA ŜTATO MALALTIGAS SIAN PRESTIĜON

Mi diros ĉe la komenco mem: temas pri Usono. La plej potenca okcidenta lando, povanta ludi decidan rolon en la paca vivo de nia epoko. Tamen...

Simila granda ŝtato ne estimas siajn prezidentojn kaj permesas ties mortigon aŭ malhonorigon. Se tio tamen ne rilatis al la problemo pri konservo de la paco sur la planedo — oni povus diri: interna afero, la usona loĝantaro mem prijuĝu.

Sed kiam temas pri paco aŭ atoma milito, tio jam ne plu estas interna (aŭ almenaŭ nur interna) afero. Ĉar de la sinteno de la registaroj de simila granda ŝtato multe dependas la konservo de la paco. La paco hodiaŭ en la epoko de plej perfektaj amasmortigiloj ne plu estas interna problemo de unu nacio, de unu lando, eĉ se tiu nacio kaj tiu lando estas unuarangaj laŭ sia ekonomia kaj politika potenco. Eĉ kontraŭe: ju pli granda estas la relativa pezo de iu ŝtato sur la monda areno, des pli atenta kaj singarda devas esti ĝia pozicio rilate la pacon kaj la militon. Ekzistas proverbo: „Al la granda ŝipo — granda krozado!“ La popolo kaj la registaro de simila lando devas esti fieraj, ke la historio apartigis al ili similan decidan rolon en la konservo de la homa kulturo, civilizo kaj libereco.

Sed la realaj eventoj parolas tute kontraŭe.

Unu prezidento (Nixon) vizitas la ĉefurbon de alia gvida ŝtato en la nuntempa mondo — Sovetunio. Li tie deklaras, ke en Moskvon oni povas eniri nur pace. Tio faris al li honoron. Kaj li ne restis ĉe la nuraj paroloj: li subskribis interkonsenton pri plibonigo de la interrilatoj de Usono kaj Sovetunio. Tiu fakto nature havas ne nur duflankan karakteron: la interrilatoj de tiuj du plej potencaj ŝtatoj reflektas rekte kaj malrekte al la tuta komplekso da mondaj interrilatoj de la ŝtatoj — grandaj kaj malgrandaj.

Dua prezidento de Usono (Ford) denove vizitas tiun landon kaj subskribas en Novosibirsk novan dokumenton pri limigo de ofensivaj atomarmiloj. La usona senato aprobas ĝin.

Tiuj vizitoj kaj interkonsentoj kreis pli favoran atmosferon en la tuta mondo. La monda publika opinio aprobis similan sintenon. Nur la ekscentrikaj ĉinaj gvidantoj kaj la plej malkaŝaj konservativaj rondoj en la okcidentaj ŝtatoj malaprobis la plibonigon de la inter-

rilatoj de Usono kaj Sovetunio. Kompreneble, forte kontraŭstaris ankaŭ la monopoloj — produktantoj de la ege multekostaj kaj profitodona amasmortigiloj. Ĉio ĉi tamen estas memkomprenebla: neniam la interesoj de la popoloj koincidas kun la interesoj de la fabrikantoj de morto, des pli en nia epoko, kiam la grandaj konzernej kaj monopoloj de atomarmiloj gajnas miliardojn da dolaroj el la produktado kaj vendado de armiloj plej danĝeraj por la monda paco.

Sed kio okazis en la plej respondecaj gvidondoj de Usono? Venas nova prezidento (Carter) kaj deklaras: mia registaro ne estas ligita kun la kontrakto subskribita de la antaŭa prezidento kun Sovetunio. Anstataŭ entrepreni novan paŝon al plua interkompreniĝo pri malararmado, pri malproksimigo de la militminaco, s-ro prezidento faras plej senrespondecan deklaron, kvazaŭ la antaŭa prezidento estis iu privata persono, ne la plej altranga ŝtatisto de tiu grandega lando. . . Nu, ni preterpasu momente tiun agon sensencan el la vidpunkto de la propra usona intereso. Sed la sama prezidento Carter baldaŭ ekiniciatas publikan ofensivon eĉ kontraŭ la nocio „sereniĝo“ (plibonigo de la internacia politika kaj milita klimato). Nu, ni ne disputu pri la senco de la vortoj. . . Tamen nova spektaklo superas ĉion: Carter subskribas en Vieno per unu mano la plej gravan ĝis nun interkonsenton de Usono kaj Sovetunio SALT-2 (pri limigo de la produktado de ofensivaj atomarmiloj) kaj per la alia — li subtenas publike planojn por instalo en ĉiuj okcidentaj landoj de atomraketoj kun meza radiuso de aktiveco, direktitaj malkaŝe kontraŭ Sovetunio. Unuflanke li deklaras, ke SALT-2 defendas tute certe la interesojn de Usono en la sama grado kiel la interesojn de Sovetunio. Aliflanke, li tuj post tiu deklaro cedas antaŭ la premo de la armilproduktantaj monopoloj kaj konsentas pri la produktado kaj instalo de danĝeraj atomraketoj! Oni devas scii: danĝeraj ne nur por Sovetunio, danĝeraj same por ĉiuj okcidentaj landoj, kiuj permesos ties instalon sur sia teritorio! Kaj samgrade danĝeraj por la talenta usona popolo! Ĉu seriozaj kaj konsekvencaj politikistoj povas tiel facilanime ludi per la plej fundamentaj rajtoj de siaj kaj de fremdaj popoloj?

Ĉu ne estas klare, ke la ŝtatoj minacataj de Usono entreprenos kontraŭpaŝojn por defendi sin? Kaj ĉu ne estas klare, ke tio nur kondukas al pliintensigo de la vetkurado en armado?

Kompreneble, la interesoj de la fabrikantoj de morto diktas la propagandon de la doktrino, laŭ kiu „ju pli multe da armiloj — des pli granda garantio kontraŭ la atommilito“. Sed ĉu la ĝis nun fabrikitaj amasmortigiloj ne sufiĉas por kelkoble mortigi la tutan loĝantaron de la planedo? Kaj ĉu la garantio kontraŭ atommilito plikreskis? La racia respondo estas tute mala: nur sistema kaj fine plena nuligo de la produktitaj kvantoj da amasmortigiloj kaj ĉesigo de la produkto de novaj sistemoj povas efektive nuligi la minacon de atommilito. Tial SALT-2

kaj preparo de nova SALT-3 inter Usono kaj Sovetunio, kaj krome — kunvoko de monda konferenco de registaroj por reala malarmado — jen la sole realisma vojo al garantio de la paco.

Troviĝis tamen multaj senatanoj en Usono, kiuj sub la premo de la monopoloj denove krias kontraŭ la ratifiko de SALT-2, elpensante ĉantaĝojn kaj mensogojn por trompi la publikan opinion. Sed la menssanaj kaj honestaj civitanoj en ĉiuj landoj komprenas al kiu dio servas similaj senatanoj: nur al la dio de la milito, al la nuntempa Marso!

Ĉu la politika realismo venkos, aŭ denove la konservativaj fortoj en Usono, Britio, Federacia Respubliko Germanio, Francio, Israelo k. s., en kompanio kun la „ruĝaj“ fratoj de Marso — la ĉinaj gvidantoj sukcesos revivigi la „malvarman militon“ tiel sopiratan de ili ĉiuj?

Ni ne perdu tamen esperon, ke finfine la politika realismo venkos en la intereso de la popoloj kaj kontraŭ la intereso de la monopoloj. Sed tion la popoloj kaj la progresemaj kontraŭmilitaj kaj porpacaj organizoj povas akiri nur per organizita kaj ege energia pacbatalo! En la vicoj de la konsekvencaj pacbatalantoj devas trovi sian avangardan lokon ankaŭ la adeptoj de Mondpaca Esperantista Movado kaj senescepte la tuta esperantistaro! Por Esperanto kaj por la utiligo de la internacia lingvo por interkompreniĝo de la popoloj kaj por paca kunvivado de ŝtatoj kun malsama ekonomia kaj socia strukturo nur povas esti sana kaj favora atmosfero de paco! Tamen la pacon oni ne almozpetas! Por la paco oni devas abnegacie labori kaj batali.

Nikola Aleksiev

Honora prezidanto de MEM

Unua tutamerika esperanto-kongreso

De la 12-a ĝis la 15-a julio 1980 okazos en la urbo San Luis, Argentino, la Unua Tutamerika Esperanto-Kongreso.

Amerikanoj kaj neamerikanoj estas kore invititaj partopreni en ĉi tiu festo, kiu okazos en urbo San Luis malavare dotita de la naturo kaj kie ĝiaj loĝantoj kaj konstruaĵoj esprimas la specife argentinajn karakterizojn.

La organizantoj entreprenis starigon de aktuala impona ekspozicio por elmontri la eĥon de ĉi tiu evento en la tuta mondo, kaj konsekvence la ampleksan disvastigon de Esperanto.

Tial ni petas al la esperantistoj de la tuta mondo, ke ili jam de nun sendu salutojn por la kongreso, preferinde per postkartoj. Libroj, revuoj, bultenoj en Esperanto, estos bonvenigataj, precipe se ĉi-lastaj enhavas sciigojn pri tiu ĉi kongreso.

Bonvolu adresi viajn korespondaĵojn al: 1-a Tutamerika Esperanto-kongreso — Cassilla Correo Central 289—2000 Rosario — Argentino.

Ljudmila Jevsejeva

MI FOLIUMAS LIBRON DE LA VIV'

Mi foliumas libron de la viv'.
Ne trovas lokon en la kor' riproĉoj,
Sufiĉis ĉio — suno kaj mallum',
rikanoj siblaj kaj amikaj voĉoj,

Min vestis rob' el silko aŭ katun'.
Post la honor' min superverŝis koto.
Pereis amo, ne pereis mi.
Versemon paralizis sent-bojkoto,

Sed nigran muton tamen venkis plum'.
Post renaskiĝ' mi spiras pli libere.
Ne gravas, ke frizaĵo grizas nun,
Mi danka hinmas al la viv' sincere.

Ljudmila Jevsejeva

x x x

Sulkojn sur frunto ne eblas eviti.
Gravas, ke sulkoj ne estu sur koro.
De maljuniĝo sin gardu spirito,
Venu, espero, kaj for — rememoroj!

NE!
Ne ploru, se ne tristas vi!
Ne ridu, sen ridinda kaŭzo.
Ne flatu buŝe aŭ per plum' —
Se vin atakas akra naŭzo.

NUR TIAL

Kelkfoje oratoras ni
ne pro enkapa pens' lavanga,
sed sole tial, ke al ni
agrabla jukas pinto langa.

Osip Holiĉev

PATRINO

Jen arestita estas fil' —
kondukas lin en nokt-trankvil'
al stacidom' faŝist-ĝendarmo.
Pafekzekut' minacas lin. . . .
— Ne malvarmumu! — la patrin'
sur kolon metas skarpon varman.

El la rusa: Ant. Tonti

Lingvo — natura fenomeno

Ekde F. de Saussure kaj ties skolo estas kva-zaŭ modo aserti, ke lingvo estas konvencio, laŭ kiu ĉiuj samlingve parolantaj homoj komprenas sin reciproke pro tio, ke ili uzas la saman konvencion; do, ke niaj vortoj havas nenian karakteron de *devigeco*. Estas certe, ke se la floro nomita „rozo“ estus konvencie nomita ne „rozo“, sed „feko“, tio ne malhelpus ĝian agrabl-odoron; tiaokaze, ĉiuj esperantoparolan-toj povus, sen ia strangeco, diri, ke „feko odoras bone“. Sed ne ĉi tie kuŝas la demando. Ĉu estus eble, ke bonodora floro estus nomita „feko“? Jen tikla punkto. Alivorte, ĉu niaj vortoj estas konvenciaj aŭ naturaj?

Fakte jes, konvencio regas grandparte en la naturaj lingvoj (en la naturajn lingvojn mi en-kalkulas Esperanton). Ĉiuj nuntempaj civili-zitaj homoj komprenas la vorton „radar“, vorto konvencie farita laŭ la komencliteroj de Radio Detecting And Ranging. Sed se la inventinto de la radaro estus decidinta ial nomi sian apa-raton „ŝtrumpf“ ĉiuj civilizitaj homoj nun komp-renus „ŝtrumpf“ tute same kiel ili komprenas „radar“. Same, se Vladimir Iliĉ Uljanov ne decidus en 1901 ekpreni kromnomon laŭ la nomo de la siberia rivero Lena, neniu en la mondo estus nuntempe „leninisto“. Nuraj konvencioj!

Sed ili tute ne tuŝas la profundajn radikojn de la lingvo. „Radar“ kaj „leninisto“ estas freŝ-dataj vortoj. Por ekscii, ĉu la vortoj de niaj lingvoj estas naturaj aŭ konvenciaj, necesas plonĝi en la plej malnovajn, la plej profundajn radikojn de la homa parolkapablo. Kaj eĉ tiel, la afero ne estas simpla. Unuavide, estas nenia simileco inter la latina *caelum*, la germana *Himmel*, la rusa *nebo*, la hebrea *ŝamajim*, la ĉina *tian*, kiuj ĉiuj difinas la ĉielon. Sed ni esploru iom la historion de ĉi tiuj vortoj, kaj ni jam trovos similecon inter la rusa *nebo* (ĉielo) kaj la esperanta *nubo*, kaj ankaŭ *nebulo*. Tio pruvas, ke okazis oftaj ŝanĝoj de senco. En anti-kva epoko, vasta grupo da homoj, aŭ la tuto de la homoj, mi ne scias, kutimis nomi *nebh* tion, kio estis alte super iliaj kapoj; kaj iom post iom, laŭ la jarcentoj, la jarmiloj, unu grupo da homoj (la slavo) kutimiĝis kompreni per tiu vorto la bluetan volbon, kiu ŝajne ĉirkaŭas nin; alia grupo da homoj (la latinoj) kutimiĝis kompreni per tiu vorto la blanka-grizajn amasojn, kiuj foje kaŝas la blueton de la volbo. Ĉiaokaze, ĉielo aŭ nubo, la primitiva radiko *nebh* difi-

nis ion *altan*; tial, eble ne estas hazardo se ni retrovas la saman sonon en *nobelo*, el la latina *nobilis*, vorto per kiu oni difinis la homojn de *alta* naskiĝo. Oni povus rebati, ke la etimolo-giaj vortaroj ne konsentas pri parenceco inter *nubo* kaj *nobelo*, aŭ ke tio estas nura hazardo. Guste la mankojn de la etimologiaj vortaroj mi volas montri. Kaj pri la hazardo... Ĉu an-kaŭ hazardo, se la *mieno* respondas al la ĉina *mien* (vizaĝo) kaj al la hebrea *min* (ekstera fi-guro, speco)? Se oni rebatos, ke „figuro“ ne estas „vizaĝo“, mi respondos, ke en iuj lingvoj (ek-zemple la franca) la „figuro“ estas ankaŭ vizaĝo.

Kontraŭe al la Saussure'a kaj Saussure'ida tezo Jean-Jacques Rousseau jam antaŭ du jar-centoj skribis, ke se la lingvoj estas konven-cioj, oni rajtas demandi al si, kiamaniere tiu konvencio povis establiĝi, se jam lingvoj ne ekzistis. Ni neniam — bedaŭrinde — scios kiuj sonoj, kiuj frazoj, eliris el la gorgoj de la Neandertalanoj aŭ, pli malproksime, de la Pi-tekantropoj. Sed se ni povus retroiri en la tem-pon per la tempomaŝino de Wells, kaj pristudi detale la sonojnuzatajn de niaj malproksimegaj prapatroj, retroiri ĝis la tempo, kiam ekestis unuaj silaboj, kiuj ne estis plu bestaj blekoj, tiam ni komprenus la profundajn radikojn de la homaj lingvoj. Ni komprenus kial en la tuta mondo de la plej okcidenta parto de Eŭropo ĝis la plej orienta parto de Azio, same kiel en preskaŭ tuta Afriko kaj Ameriko (se paroli pri la indiĝenaj lingvoj kompreneble) oni nomas la *patrinon*, kaj ankaŭ ofte la *mamon*, per vor-toj, kiuj komenciĝas per la litero *M*, aŭ alme-naŭ ĝin entenas.

Ni ne povas vojaĝi tra la tempo, sed ni vo-jaĝu tra la spaco, kaj ni juĝu. La hindeŭropa grupo estas unuvorta: latina *mater*, greka *me-ter*, galla *mater*, ĝermana *muoter*, slava *mati*, armena *majr*, irana *mâdar*, sanskrita *mâtr*. Kaj de ĉi tiuj lingvoj devenas multaj modernaj, kiuj kovras la tutan Eŭropon kaj grandan par-ton de Azio: la islandanoj diras *móðhir* same kiel la litovoj diras *motina*, kaj la nepalanoj *mata*. Oni povus rebati, ke la diritaj lingvoj devenas ĉiuj de la hindeŭropa, kaj similas in-ter si nur pro tio, ke ili estas parencaj. Do ni esploru lingvojn, kiuj laŭ la ĝenerala opinio havas nenion komunan kun la hindeŭropa fami-lio. Kvankam loĝantoj en Eŭropo — la finnoj parolas lingvon ne hindeŭropan, kaj tamen no-mas la *patrinon* *emo* aŭ *emä*; la estonoj diras *ema* kaj la vaskoj *ama*. La antikvaj egiptoj diris *mût*, kaj la asirianoj *imma*. Oni trovas hebree *em*, siriake *eme*, arabe *umm*. En Ĉinio, oni uzas *mâ* kaj *mŭ*, en Tibeto *ma*, en Birmo *emi* kaj *eme*, en Malajzio kaj Indonezio *mamy*. Ĉu ni transiru al Afriko? La kafroj diras *ma*, la svahiloj *mama*, kaj pri la aliaj... mankas al mi la vortaroj. En Ameriko, ĉe la aztekoj kaj ĉe la majaoj, oni uzas *min*. Mi ne volas esplori la tutan mondon pri la nomo de la mamo; ta-men la egiptoj diris *meneĝ*, en kiu la komenca *M* respondas al la latina-greka *mamma*. Foje,

la konsonanto *M* deflankiĝis al *N*, sono iom proksima; tial ni trovas por la patrino la hungaran *anya*, la turkan *ana*, la amharan (-etio-pan) *ennat*, la nahuatlan *nantli*.

Oni devas konfesi, ke se tio estas nura konvencio, kiel asertas ĝin la tezo nuntempe ĝenerale akceptita, tiu konvencio sstas bone kaj universale establita, kaj pruvas, ke sen ia dubo UNESKO ekzistis longan tempon antaŭ la Kromanjona Homo. Ĉu ne estus pli science diri, ke tio estas *natura* vorto, ke estulo el la homa genro *nature* prononcas la *M*-sonon, kiam ĝi nomas la patrinon, kaj ke *M* estas natura universala vorto signifanta „patrino“. Ekde tiu universala primitiva vorto, diversaj fonetikaj ŝanĝoj okazis, kaj produktis la nunan diversecon de la vortoj, en kiuj oni tamen povas retrovi la primitivan universalan radikon. Sed kial ĝuste tiu *M*-sono, kaj ne alia? Eble pro tio, ke la labialo *M* elparoliĝas *nature*, kiam oni faras per la lipoj la geston de la mamsuĉado. Sed eble ankaŭ pro tio, ke la *likva* konsonanto *M* estas universale la signo de la ino, de la akvo, de ĉio fruktodona: araba *ma'*, hebrea *majim*, aramea *majja*, fenica *mem*, egipta *mû* (akvo), malaja *ma* (vivanta akvo), ĉina *mang* (aspekto de la akvo), kaj — kiaj ne? — hindeŭropa *mar*, finna-estona *meri*, hebrea *jam*, japana *umi* (maro). Por ni, esperantlingvanoj, la *natura* vorto por „patrino“ estus *matro*, kiel en Ido; sed *praktike*, por simpligi la vorttrezoron, ni preferas difini la *matron*, kiel patro-inon.

Kaj kion pri la patro? Samkiel la patro-ino estas difinita per la *likva* konsonanto *M*, la patro-viro estas difinita per plosiva konsonanto, kiu estas foje la labialo *P*, aŭ la najbaraj sonoj *B* aŭ *F*, foje la dentalo *T*. Ni esploru la *P-B-F*-grupon. Latina-greka *pater*, ĝermana *fadar*, irana *pedar*, kurda *bab*, sanskrita *pitṛ*, armena *hajr* (en kiu la *H* devenas de antikva *P*) kaj *bab* (kiu signifas „avo“); ekster la hindeŭropa grupo: hebrea *ab*, aramea *abbâ* (el kiu la vorto *abato*), araba *ab* aŭ *abû*, turka *baba*, hungara *yapa*, majaa *pap*, svahila *baba*, ĉina *fu* kaj *ba*, birma *epha*, malaja *bapak*, samojeda *ab*, kamĉatka *apaĉ*.

Nun, la *T*-grupon. Latina-greka *atta*, albana *at*, litova *tévas*, rusa *otec*, kroata *otac*, hitita *attaš*; ekster la hindeŭropa grupo: turka *ata* (kiel en la nomo de Atatürk), kazaua-ujgura *ata* (kiel en la urbonomo Alma-Ata, la patro de la pomoj), hungara *atya*, vaska *aita*, estona *ätt*, japana *titi* kaj *to*, nahuatla *tatli*. Kaj la listo ne estas kompleta. Sed, diros la kontraŭuloj, estas esceptoj! Jes, kompreneble, kiel en ĉiuj reguloj. Ĉi tie la esceptoj klariĝas ofte per la fakto, ke en iuj lingvoj — eble pro antikva matriarka strukturo — ekestis konfuzo inter la nomo de la patro kaj tiu de la patrino: bonan ekzemplon donas la gruza (-kartvela) lingvo, en kiu la patro nomiĝas *mama*, dum la patrino nomiĝas *deda*. Ankaŭ en Tahitio la patro estas *me*, kaj en Havajo *ma*. Ankoraŭfoje, se temas pri konvencio, oni devas akcepti, ke iu Aŭstralopiteko,

antaŭ jarmiliono, sur la vojo al la homiĝo, ankoraŭ ne en posedo de ellaborita lingvo, telegrafis al ĉiuj partoj de la mondo por sciigi siajn samtempulojn, ke dekrete oni rajtos nomi la patron nur per *P* aŭ *T*.

Evidente, por trovi tiajn universalajn parencecojn, necesas esplori la fundamentajn vortojn de la homaj lingvoj, kaj ne la nomojn de iuj modernaj konceptoj aŭ aparatoj, kiel „socialismo“ aŭ „aviadilo“. Kvankam, pri „aviadilo“, mi ne povas deteni min de supozo pri ebla rilato inter *avis*, la latina nomo de la birdo, kaj la hebrea *awwaz*, araba *iwazz*, kiuj difinas la anseron. Kaj la ansero estas ja birdo. Kaj birdo tiel grava, en la antikva simbolaro, ke antaŭ nepreciza sed longa tempo oni kreis la Ludon de l'Ansero, plenan je simboloj, kaj ke visigota regino de Tuluzo ne timis nomi sin Pedaŭka (Anserpiedo), kaj certe ne temis pri aludo al stultega flugbesto. Eble ankoraŭ hazardo. Estas strange, ke ju malpli la homoj kredas je mirakloj, des pli ili kredas je hazardo. Eble nure nomŝanĝo.

Sed ni revenu al nia temo. Ni imagu iun Pitekantropon, sen socia organizo, sen religio, kiu vivas preskaŭ kiel besto, kaj tamen sentas en si ion neprecizan super la bestoj, ion homan. Kiun umon, kiun aĵon, li emas rimarki unue? Kiu umo havas por li plej grandan gravecon? Se mi ne eraras pri la homa naturo, certe estas li mem. Mi supozas, ke nia patro Adamo, simbola nomo, estis jam sufiĉe inteligenta por esti iom egocentra. Do ni esploru en la tuta mondo la vorton por „mi“. Kun surprizo ni elkovras, ke en la tuto de la homaj lingvoj ĝi aperas (krom kelkaj esceptoj) sub nur du formoj. Jes, nur du, por la tuta mondo. La formo „mi“ kaj la formo „ngo“. Vortojn similajn al la esperanta *mi* ni trovas en la latina-greka *me*, ĝermana *min*, slava *mene*, sanskrita *mam*, kiuj ĉiuj signifas „min“; la gaela *mi*, la bretona *me*, la irana *man*, signifas „mi“. Ekster la hindeŭropa grupo: firna *minä*, estona *mina*, gruza *me*, vaska *ni*, svahila *mimi*, volofa *man*, haŭsa *ni*, nahuatla *ni*, dakota *mi*, jukagira *mot*, jakuta *min*, ostjaka *ma*, manĉura *mini*, mongola *minu*, tasmania *mi*. Ĉar mi kredas nek miraklojn, nek dion hazardon, mi konkludas, ke se la gaeloj de Skotlando nomas sin mem per *mi*, tute same kiel la indianoj de Dakoto, la iamaj Tasmanianoj, kaj la nuntempaj esperantistoj, estas ankoraŭfoje pro tio, ke tiu sono estas la *natura* sono por la koncepto de „mi“. Jam estis dirite, ke la sono *M* estas iom surda, la plej proksima al la ripozo; same la ideo de „mi“ estas proksima al la ripozo, ĉar por konscii pri la „mi“, oni ne eliras el si mem.


Sed kelkaj popoloj havis alian koncepton pri la „mi“ (aŭ havis kune ambaŭ konceptojn), kaj konsideris ĝin kiel la ĉefon de la personoj, la unuan koncepton; tial ili reprezentis ĝin per sono ege pli brila, pli forta, la guturalo *G* aŭ *K* ofte nazaligita. Tiel oni ricevas la formon *ngo*: latina-greka *ego* (el kiu la franca *je*, la itala *io* ktp), gota *ik*, hitita *ug*, egipta *ink*, birmanga,

keĉua *ngo*, malaja *aku*, tagala *aka* en ĉina, la pekina dialekto diras *wo*, sed en aliaj dialektoj oni trovas *ngo*. La malfortiĝo de la G/K en Z/S donis interalie: slava *az*, kurda *ez*, armena *jes*. Mi ne deziras dormigi la leganton per la detala priskribo de la vorto por „ci“; oni sciu nur, ke ĝi universale entenas la sonon *T*, de la nahŭatla *ti* ĝis la birma *tin*, tra la latina *tu* kaj la hebrea *atta*. Opozicie al la *M*, la *T* estas ja unu el la plej fortaj el la konsonantoj, tiu, kiu postulas la plej grandan eliron el si; tial ĝi taŭgas por nomi „la alian“ — „cin“.

Ĉu konvencio? Neeble! Aŭ ĉu la aztekoj plagiatis la birmanojn, aŭ inverse? Stulte! Oni devas rekoni, ke popoloj tre diversaj, tre malproksimaj unu de alia, sen interrilatoj, elektis *nature* similajn sonojn por nomi similajn aĵojn aŭ konceptojn. Oni devas rekoni, ke ĉia ideo de konvencio estas senelira fabelo, rekoni, ke la lingvoj estas NATURAJ FENOMENOJ.

Glosaro

- *Aŭstralopiteko*: fosilia homo, vivinta antaŭ la Pitkantropo, antaŭ pli ol unu miliono da jaroj.
- *Haŭso*: ano de negra popolo vivanta en Nigerio.
- Jukagiro*: ano de nordsiberia popolo.
- *Nahŭatla*: lingvo de la meksikaj Indianoj.
- *Ostjako*: ano de okcidentsiberia popolo.
- *Siriaka*: semida lingvo parenca kun la aramea.
- *Tagalo*: ano de malaja popolo en Filipinoj.
- *Volofo*: ano de negra popolo en Senegalo.



Striko

Ĉiu rigardo direktiĝis al la horloĝo. Por la naŭa mankas dek minutoj, naŭ, ok, sep, ses, kvin, kvar, tri, du, unu, jen la naŭa horo! La laboro ĉesas, ĉiu laboristo restas staranta ĉe sia laborloko. En la laborejo regas profunda silento. Neniu parolas, kaj ĉiu evitas sin movi. La ordo estas kompleta. Ĉiu konsideras sin respondeca pri tio, kio okazas. La momento estas historia, unika por ni. Por la plej granda parto el ni tiu striko estis la unua en nia vivo. Kuraĝe, sentime, sed kun intereso kaj sento de respondecado ni atendis tion, kio okazos poste. Anekdotite mi povas diri, ke dum la strika horo neniu iris al la necesejo, fakto kontrolita de mi.

Efektive, la antaŭan tagon en ĝenerala asembleo, sub gvido de niaj reprezentantoj ni decidis striki dum unu horo. Post kvardek jaroj de perforta silentado, ni decidis agadi, protesti, postuli niajn rajtojn. La decido striki estis unuanima, precipe de la junuloj. Oni planis kaj komentariis la eventualan disvolviĝon de la morgaŭa striko. Niaj delegitoj antaŭvidis baldaŭan reagon de la entreprena direkcio.

La senlabora horo fariĝis longa, peza, streĉa, sed ĝi forpasis kaj nenio okazis. Interne, ni ĉiuj restis kontentaj. Nia unua batalo, bataleto finiĝis. Kion ni atingis? Ĉu ĝi helpas nin? Ĉu la mastro de la entrepreno konsentos al niaj justaj postuloj?

La striko eksplodis pro la fakto, ke la entrepreno neniel volis aŭdi kaj studi niajn proponojn por plialtigo de nia salajro kaj aliaj laboraj plibonigoj. La senfrukta dialogo inter la entrepreno kaj niaj delegitoj jam daŭris du monatojn kaj nia pacienco finiĝis.

La strika horo forpasis kaj la direkcio de la entrepreno reagis nek favore, nek malfavore. Je la deka horo ni rekomencis la laboron. Sed tio ne signifis, ke ni ĉesigis la lukton. Male, ĝi kuraĝigis nin por plia daŭrigo. Vespere ni havis novan ĝeneralan kunvenon por prepari la morgaŭan batalon. Ni decidis, ke la sekvan tagon la striko komenciĝos same tiel je la naŭa horo kaj ke ĝi daŭros la tutan tagon.

La sukceso de la striko ne dependas nur de la teniĝo en la laborejo. Grava punkto en ĉi tiuj luktoj estas la familio. Ĉiu strikanto scias la influon de la edzino, de la familio. Tute intence la morgaŭan tagon mi demandis al iuj el miaj

laborkamaradoj, kion diris via edzino? Iliaj respondoj estis tre similaj: daŭrigo en niaj justaj postuloj, sed serioze atenti ne perdi la laborpostenon, kio estus terura frapo por la disvolviĝo de la hejma vivo.

La sekvantan tagon ni daŭrigis nian lukton. Nia protesto estis pli forta. Se la antaŭan tagon ni haltigis la laboron nur dum unu horo, hodiaŭ ekde la naŭa horo matene ni ne plu laboris dum la tuta tago. Ni perdis la timon, kiu nin kvietigis la antaŭan tagon, ĉar ni jam moviĝis de unu loko al alia, kaj la grupa konversacio estis tre ofta. Ni jam akiris fidon, kuraĝon kaj luktospiriton.

La horoj forpasis kaj nenia novaĵo venis de la entreprena direkto. Ŝajnis, ke ĝi estas psikologia batalo. Ni okazigis alian asembleon kaj prenis decidon ne forlasi la laborejon por tagmanĝi. Ni restus interne, se necese ankaŭ dumnokte. Ofte niaj delegitoj sincere kaj kuraĝe alparolis nin. Nova generacio el batalantaj homoj naskiĝas en Hispanujo, ne sufiĉe poluritaj, sed honestaj kaj pretaj defendi siajn kamaradojn. Ke ili restu ĉiam fidelaj al ĉi tiuj principoj de kamaradeco kaj solidareco de la laborista klaso, mi pensis aŭskultante ilin. Edzinoj, parencoj kaj amikoj kunportis al ni manĝaĵojn. Je la dua posttagmeze, la entrepreno donis vivsignojn kaj alvokis niajn reprezentantojn al la oficejo. Silento kaj scivolo regis inter ni. Ni demandis unu la alian, ĉu la entrepreno konsentos, ĉu ĝi akceptos niajn proponojn? Niaj postuloj ne estis grandaj, kaj multaj el ni pensis, ke eble la entrepreno akceptus niajn petojn. Sed ne, tio ne okazis. Revenis la delegitoj kaj informis nin, ke la direkto de la entrepreno akceptis nur minimuman parton el niaj proponoj. Denove la delegitoj alparolis nin. Ili tuŝis ekonomion, politikon, sociajn vidpunktojn, plialtigon de la vivkosto, de la manĝaĵoj. Ĉio estis samtempe pritraktita en iliaj paroloj, tre ofte kun interveno de iu el la kamaradoj tie ĉeestantaj. Komprenoble ni decidis ne akcepti la proponojn de la entrepreno kaj daŭrigi la strikon. La junuloj estis la plej decidemaj ne cedi al la manipulado de la entrepreno.

Ofte mi sidis sola kaj pensis, kio estas ni laboristoj? Ĉu azenoj dresitaj nur por labori; en kia socio ni vivas, ĉu unu persono rajtas utiligi nin kiel marionetojn; kial nia hejma paco kaj feliĉo dependas nur de la kaprico de unu persono; kiaj leĝoj estas en nia lando; kial ni estas batataj pro la nura fakto, ke ni petas iomete pli da salajro; kial ni estas devigataj labori dum en la lando estas homoj, kiuj produktas nenion kaj ricevas tre altajn enspezojn; ĉu niaj filoj ne rajtas manĝi, studi, esti feliĉaj en hejma etoso? Ne, ne, io ne funkcias bone, mi pensis. La delegitoj denove kontaktis la entreprenan direkcion. Maltrankvileco komencis regi inter ni. La strikado malserenigas ĉiun homon. La ebla fermo de la entrepreno turmentis multajn kamaradojn, kiuj havis grandajn familiajn devojn. La junuloj,

kiuj en tiu tereno familia ne havis tiel gravajn respondecojn, insistis pri daŭrigo de la striko kaj ne cedo en niaj justaj salajropetoj.

En tiu nervosa stadio forpasis la horoj sen atingi interkonsenton inter ni kaj la entrepreno. La pensoj venis kaj flugis de niaj kapoj kun granda rapideco. Kiel finiĝos ĉio?

Dum tiuj tagoj komenciĝis la tiel nomata „nova hispana demokratio“, sed la leĝoj estis tiuj antaŭaj. Do, nia lukto, kiel la tiutempa batalado de ĉiuj hispanaj laboristoj havis du celojn: unu el ili, forigi la antaŭajn leĝojn, la alia — atingi niajn justajn kaj dignajn rajtojn. La fama vertikala sindikato ankoraŭ estis valida, sed ĝi jam komencis morti. Dum la lasta epoko de tiu ŝtata sindikato aperis en ĝi homoj pretaj labori kaj kunlabori favore al la laboristaro, ili estis la tre konataj laboristaj advokatoj, homoj junaj kaj konsciaj, kiuj ne plu volis toleri la submetiĝon de la laboristaro al tiu maljusta sindikato. Tiuj advokatoj estonte estus firma bazo de la laboristaj sindikatoj. La konsiloj de ĉi tiuj advokatoj ĉiam estis tre interesaj kaj sekvindaj. Oni anoncis al ni, ke vespere unu el tiuj advokatoj vizitos nin. Ĉiuj atendis scivole pri tio, kion li diros al ni. Intertempe niaj reprezentantoj revenis kaj nin informis ke la direkto cedis iom, sed niaj delegitoj ankaŭ devis montriĝi ne tiel postulemaj. Estas evidente, ke ambaŭ vidpunktoj alproksimiĝas. Sed la proponoj prezentitaj de la entrepreno ne estis akceptindaj, kaj post voĉdonado laŭ la sistemo „levita brako“, oni decidis daŭrigi la strikon. Laŭ opinio de iuj el niaj delegitoj ni devus resti interne de la fabriko dum la tuta nokto, se tio ne okazus hodiaŭ, nepre ni devus ĝin realigi morgaŭ, se la situacio ankoraŭ ne estus aranĝita.

Mi pensas, ke neniu el miaj laborkamaradoj tiun nokton dormis trankvile kaj komprenoble ankaŭ mi ne.

Alvenis la nova tago kaj kutime ni reciproke deziris al ni sukcesan tagon. La mienoj ne estis gajaspektaj. La venontaj horoj kredeble estos tre riskaj por nia laborposteno, por nia familio.

Oni asembleis, kaj la delegitoj informis nin pri la diversaj demarŝoj realigitaj dum la pasinta nokto en iuj oficialaj instancoj de la vertikala sindikato. Ili sciigis nin, ankaŭ, ke diversaj delegitoj el aliaj entreprenoj promesis sian helpon kaj se necese ili instigus siajn kamaradojn al striko por apogi kaj subteni nian justan lukton. Sed la horoj forpasadis tre malrapide kaj nenia vivsigno venis de la entreprena direkto. Ĉiu sin demandas kio okazos, ĉu hodiaŭ ĉio aranĝiĝos, ĉu la direkto akceptos niajn proponojn, ĉu la entrepreno fermiĝos, kion ni devus fari tiukaze?

Alvenis la tagmezo kaj ni troviĝis en sama situacio. Estis nenia novaĵo. Ni restis enfermitaj en la laborejo kaj do ne iris hejmen por tagmanĝi. Komencis veni familianoj alportantaj manĝaĵojn. Pli ol malsaton ni sentis indignon. Sed ni troviĝis meze de la batalo kaj ni devis ĝin daŭrigi, eĉ se ni atingus nenion. Dum ĉi

tiuj paŭzoj la kamaradoj dividiĝis en grupojn. La ĝenerala temo de ĉiu grupo estis nia lukto. La junularo estis pli optimisma. Iuj el la junuloj diris al mi: vi, kiuj estas edziĝintaj estas kiuj pli forte devas agadi, subteni kaj daŭrigi nian proteston pro la fakto, ke viaj bezonoj familiaj estas pli grandaj, tial ne malkuraĝiĝu ĥaj antaŭen. En la ĵurnalo aperis informo pri nia lukto — fakto, kiu favoris nin. Denove la delegitoj estis alvokitaj de la direkcio. Ni atendadis kun espero la revenon de niaj reprezentantoj. Sed post ilia reveno nia espero estingiĝis. Estis nenia interkonsento. La entrepreno akceptis nur iujn el niaj proponoj. Nova asembleo, en kiu la delegitoj eksponis la nunan stacion de nia lukto kaj la decidojn de la entrepreno. Fine ni decidis ne akcepti la lastan oferton de la entrepreno kaj daŭrigi la strikon.

La tranoktado en la fabriko jam estis decidita, eĉ pli, ni ne forlasos la laborejon ĝis la entrepreno akceptos niajn proponojn. Ni ankaŭ timis, ke se ni forirus, eble ni ne plu povus eniri, kio signifus pli aŭ malpli nian maldungon. Kiam ni jam estis pretaj por pasigi tie la nokton, alvenis la advokato de la sindikato. Li informis pri la demarŝoj faritaj en la sindikato kaj konsilis nin iri hejmen. Li certigis al ni, ke pro diversaj kaŭzoj la entrepreno ne povas „fermi la por-

dojn“, krome, li diris, vi riskas, ke la polico elpelu vin, kio komplikus la aferon.

La sekvan tagon je la sepa matene, ni prezentigis en la laborejo, kiu ne estis fermita, sed ni ne laboris laŭ decido de la antaŭa tago. Je la naŭa kaj duono niaj delegitoj estis alvokitaj de la direkcio. Ĉi-foje ni ne atendadis longe. Niaj reprezentantoj nin informis, ke respondeculo de la entrepreno venos por persone paroli al ni. La posta disvolviĝo de la konflikto tute surprizis nin. La respondeculo akceptis niajn proponojn, aŭ almenaŭ tiujn plej gravajn, kaj la striko finiĝis. Ni interkonsentis rekomenci la laboron posttagmeze kaj ni reiris hejmen, jen absurdaĵo de la vivo, kun la alportitaj tagmanĝoj. Tiu frua reveno timigis la familianojn, ĉar ili pensis, ke ni jam estis maldungitaj. Post klarigo de la okazintaĵoj, ĉiu restis kontenta kaj trankvila. Jen luktoj kaj konfliktoj, kiuj ĉiam ekzistos, dum ni ne kapablos krei, starigi socion pli justan, en kiu la homo estu konsiderata kiel homo.

Luis Serrano Pérez (*Hispanio*)

Gloso

demarŝo — paŝo, ago

Porpaca ekspozicio en Samarkando

La 20-an de septembro en la centra ekspozicia salono de urbo Samarkando (Uzbekistano) okazis solena malfermo de grandskala ekspozicio „Estu ĉiam la paco!“, dediĉita al la Internacia Jaro de Infano. Ĝi estis organizita de Samarkanda Esperanto-Klubo de Interpopola Amikeco kunlabore kun la regiona filio de Uzbeka Amikeca Asocio. Salutparolis la dua sekretario de la urba komitato de komsomolo k-dino L. Z. Kelamova, respondeca sekretario de la regiona filio de Uzbeka Amikeca Asocio M. V. Muminova, prezidanto de la regiona porpaca komisiono N. G. Karimov, estrarano de Samarkanda Esperanto-Klubo de Interpopola Amikeco, kandidato de medicinaj sciencoj V. R. Lemelev. Ĉiuj elpaŝintoj aprecis la porpacan aktivadon de samarkandaj esperantistoj kaj substrekis la gravan rolon, kiun Esperanto plenumis en la realigo de la ekspozicio. La vicurbestrino R. Husianova tondis la rubandon kaj deklaris la ekspozicion malfermita. La ekspozicio estis vere internacia. Estis eksponitaj materialoj (porpacaj afiŝoj, flugfolioj, revuoj ktp), ricevitaj el ĉ. 30 landoj. Pri la evento vaste sciigis la gazetaro, aperis tipografie presitaj afiŝoj kaj invitiloj. Ni plenkore dankas al ĉiuj reeĥintoj kaj speciale al la personoj grave kontribuintaj por la sukceso de la ekspozicio. Roland

Schnell (la de li gv. data MEM-sekcio tradukis nian al okon germanlingven kaj ĝin disvastigis en porpacaj medioj de FRG — jen vere imitinda ekzemplo!), Lenke Dombovári, Zoltan kaj Eva Váli (Hungario), Joe Gamble (Usono), Henri Masson (Francio), Petro Poliŝĉuk (USSR). La ekspozicio tre sukcese funkciis dum du semajnoj. Estis decidite ke en Samarkando ĝi fariĝu tradicia kaj ĉiujara. Tial la alvoko de nia klubo restas daŭre valida.

Anatolij Ionesov

SURSTRATA TEATRO KONTRAŬ NATO

Grupo sin nomanta „Por rekta agado, neperforta kaj kontraŭ NATO“ starigis en Kataluna Placo en Barcelono surstratan teatron kun la celo protesti kontraŭ la integriĝo de Hispanio en NATO. Ĉi-pachatalanta grupo, ligita al la „Domo de Paco“, havas internacian karakteron kaj sciigis, ke ĝia ŝajna Asekura Kompanio, „La Prezervanto“, havas kiel fundamentan celon, liveri polisojn absolute fikciajn sur kiuj oni stimulas la gravan danĝeron, kiun por Hispanio prezentas ties integriĝo en NATO. Aliflanke, la partoprenantoj de tiu kontraŭmilita grupo informis ke tiel en Zamora, kiel en Avila, iu dispozicia aparato por la ne-milita engaĝiĝo de Hispanio, konata sub la signo „Coname“ realigis simultan agadojn proteste antaŭ la ebla establado de milita bazo en Kanariaj Insuloj.

(El la gazetaro)

GRAVEGA SANĜO DE FUŜKONVINKOJ

En n-ro 3/79 de l' organo de „Aŭstria Ligo por la Homaj Rajtoj“ „Das Menschenrecht“ Vieno, troviĝas artikolo. Jen parto el ĝi:

„... Malfruege, sed tamen jes la romokatolika, mondampleksa eklezio ŝanĝiĝis depost ĝia papo Johano XXIII-a en pledanton por la nedivideblaj homaj rajtoj, post jarcentoj de plej kruela persekutado de alipensantoj. La koncernaj konfesioj ankaŭ de ties tri posteuloj impresas nun des pli kredindaj, ke la normigo de l'unu, tago de nova jaro kiel „tago de la mondpaco“ de la romkatolikoj, sed ĉefe la ĝisnuna agado de la papa komisiono „Iustitia et Pax“ servas ne nur al pacema interkompreniĝo de la popoloj, sed evidente ankaŭ avancigas la konscion de la katolikoj pri la homaj rajtoj. Ekzemple en Latinameriko stariĝas eklezio renovigita kaj de ĉiam pli da episkopoj subtenata, kiu laŭ la ekzemplo de Kristo publike solidariĝas kun la subprematoj kaj ekspluatatoj, tiel klopodante por laŭeble kompensi la krimegojn, „sub la signo de la kruco“, farotajn antaŭ 500 jaroj kontraŭ la indiĝenaj gentoj kaj triboj. Eĉ en la Eŭropa Okcidento kelkiuj politikaj veraĵoj estas hodiaŭ ofte pli klare dirataj de katolikaj episkopoj ol de por si mem satigitaj ĉefuloj socialistaj. Tiel i. a. tuj antaŭ la faligo de la malbonfama diktatoro de Nikaragvo Somosa, la prezidanto de l' internacia movado „Pax Christi“, la itala episkopo Luigi Betazzi konstatis:

„... Mondvastan sensacion estigis la okazaĵo „Ĉilio“, kie la laŭleĝe instalita registaro perforte ekŝiĝis pro la sinenmikso de multnaciaj asocioj el Nordameriko kun konfesitaj konspirado kaj tolerado de l'usona registaro. Hodiaŭ ni havas la okazaĵon Nikaragvo, kie malamata daŭrodiktaturo estas tolerata kaj kuraĝigata de la grandaj okcidentaj demokratioj, aŭ la okazaĵo Argentino, kie la torturo, malaperigo kaj murdado je dekmiloj da politikaj kontraŭuloj estas konsiderataj kiel laŭnorma policagado.

Ĉi ĉio klarigas, kiel necesiĝis akceli la diskonigadon de tiaj informoj kaj instrui la publikan opinion tutmondan pri ĉi tiuj difektoj. Samtempe la ho! — tiel horora moralinstruo devas uziĝi, por malkuraĝigi la subpremantojn kaj por persvadi la konspirantojn, ke ili ne flankenigu siajn moralajn kaj socialajn konvinkojn nur pro ekonomiaj interesoj. Ĉi tion fari estas eĉ multe pli alta devo por kristano.

Estus ja strange, se la laŭdinda pledado por la vivo ekde ĝia estiĝo en la korpo de patrino

ne daŭrus ankaŭ en la defendo de la vivo kaj digno de tiuj, kiuj pro matura konscio kaj propraj decidoj atingis la perfektan homecon. La respekto al apudulo devas etendiĝi al ĉiuj homoj. La nova en la kristaneco estas ja ĝuste la ĉionampleksanta amo ankaŭ al malamikoj, politikaj kontraŭuloj kaj tiuj, kiuj kontraŭas nin mem. Tial nia kulpigo estus des pli forta kaj persista, se nacioj subpremantaj, torturantaj kaj mortigantaj krome sin nomas eĉ kristanaj kaj pro tia konduto faras sian konfesion malkredinda aŭ laŭ s. Paŭlo — blasfemas la nomon de Dio.

La komunaĵo de kristanoj sentu ĉi tiun devon de solidareco kun ĉiuj subpremataj, torturataj kaj persekutataj homoj sur la tero. Ankaŭ malgraŭ penegado kaj oferoj oni havigu al si nedubindajn atestaĵojn, trovu taŭgajn kanalojn de komunikado kaj provoko al la granduloj kaj potenculoj sur la tero. Jen la vojo, ami apudulon konkrete, ĉiun apudulon, kiu dum sia vivo estas atakata kaj terenbatata. Li estas ja precize kiel tiu viro, kiun oni lasis duonmorta kuŝi sur la vojo de Jeruzalemo al urbo Jeriĥo; la religianoj preterpasis senatente, sed la bonkora samariano, la kontraŭklerikulo tiama, helpis al li (L. 10). S. Johano esprimas ĉi tion per vorto estanta samtempe inspiraĵo kaj provoko: „Se iu asertas ami Dion, sed malamas sian fraton (apudulon), li mensogas. Ĉar, kiu ne amas sian fraton, kiun li vidas, ne povas ami Dion, kiun li ne vidas (1. Joh. 4.20)“ Fino de la citaĵo.

„Das Menschenrecht“ aldonas, ke ĉi tiu salutinda alvoko estis nek en „Wiener Kirchenzeitung“, nek en „Präsent“ (Innsbruck), nek en „Furche“, plej grava kulturrevuo katolika en Aŭstrujo, nek en la informiloj de la ceteraj aŭstrujaj diocezoj! Jen ankoraŭaj postsekvoj de la jaro 313 p. K., kiam la romia imperiestro Konstanteno I-a eldonis en Milano (tial „Edikto de Milano“) edikton deklarantan la kristanan religion ŝtatreligio, ĝis tiam sange persekutita kaj transvivinta en katakomboj. Nun ĝi fariĝis ankaŭ proprietulo de landaregoj kaj tial fakte ankaŭ kapitalisto en la nuna senco de la vorto. Ĉi tiu kristana religio kiel institucio por homoj restis ĝis hodiaŭ, — sed jam en malpliĝanta amplekso kaj apenaŭ ankoraŭ defendebla. Kaj la plej multaj el ĝiaj gvidantoj estis kaj restis egoismaj, potencamaj homoj. Tiaj ili ankaŭ fuŝregadis. Sed nun jam konturiĝas la eklezio de la baldaŭa estonteco tute alispeca, sciu komenctipa. Bedaŭrinde restas, ke pro ne nepre aprobindaj motivoj la diversideaj pacorganizaĵoj ne estas pretaj aliĝi al MPK, kvankam ankaŭ iliaj gvidantoj konscias la malfortigon de la pacagado per malunueco. Antaŭ jaroj mi vane klopodis persvadi „Pax Christi“ al membriĝo ĉe MPK; sed la individua egoismo estis kaj estas pli forta, kvankam tiaj gvidantoj de „pacmovadoj“ nepre fariĝis kaj fariĝas malfidindaj kaj malindaj por la plenumo de tiu providenca tasko por la bono de la homaro.

D-ro Adolf Halbedl (Aŭstrujo)

ATUROJ — KOMPLEKSA MINORITATO

Marjo Nordjo — Universitato de Venecio

1.1 Ene de la irana fandujo estas konsiderinda parto de la monda atura komunumo, kiu estas dissemita tra kvar kontinentoj: Azio, Eŭropo, Ameriko kaj Oceanio. La origino de tiu ĉi popolo serĉeblas ene de la imaga triangulo, kiun formas la urboj Urfa (antikva Edeso, nun distrikta ĉefurbo en suda Turkujo), Reza'iyeh (iama Urmio situanta sur la bordoj de la samnoma granda sala lago en irana teritorio), Bagdado (apud la sanktaj urboj Seleŭkio-Ktesifono, religiaj ĉefurboj de la nestoria eklezio, nun en Irako).

La atura popolo, kvankam vivanta en ruiniga dissemiteco, kapablis konservi sian kolektivajn dignon. Temas certe pri rimarkinda atingo ĉe popolo, kiu estis devigita elmigri antaŭ ne longa tempo kaj kiu sekve ne havis la eblecon firmigi siajn malproksimajn komunumojn en antaŭ-industria epoko.

Per serĉado de sia historia kaj lingva identeco aturoj klopodas nun firmigi kunest-emon, kiun igas malfirma la dissemiteco kaj la politikaj okazintaĵoj en la gastigantaj landoj, precipe rilate la komunumojn loĝantajn en maŝrekaj landoj (la tiel nomataj landoj de la Proksima Oriento).

Cetere, eĉ la nomo „aturoj“ (kunligita kun la nomo de la antikvaj „asiroj“) estas rezulto de politika pluvivi-volo.

1.2. Je lingva nivelo ilia situacio estas simila al tiu de pluraj etnaj grupoj, kiuj nur antaŭ ne longa tempo ekhavis skriban tradicion. Tiu situacio estas malplibonigita pro tio, ke antikve aturoj havis riĉan religian kaj literaturan kulturon, tiun de la siria eklezio.

Sed la fendo inter la normale uzata lingvo kaj la literatura lingvo estas tia, ke ĉia ajn teorie ebla uzo de la literatura lingvo estas malebla, kvankam tiusencaj klopodoj ne mankas.

Ekde la plej granda disfloro de la siria literaturo (2-a — 5-a jarcentoj post Kristo) la malsameco inter la du lingvoj ade pliiĝis. Fiksado de skribmaniero por la moderna lingvo komenciĝis en la mezo de la pasinta jarcento. Nun aturoj konsideras sin mem popolo kunligita per sama etna origino kaj per komuna lingvo, kiun oni ne kapablis unuigi.

1.3. Aturoj, laŭ la nacia ideologio nuntempe rimarkebla en ilia gazetaro en Irano kaj ekster Maŝreko, estas unu nacio preter la tradiciaj dividoj laŭ religiaj kristanaj konfesioj. Ili esperas atingi sian kompletan rekuniĝon ĝuste per preteriro de ĉi tiuj disdividoj.

Cetere la reiro al la antaŭ nelonga tempo establita ŝtato Israelio de la enaj malplimultoj, hebreaj laŭ religio kaj nov-arameaj laŭ lingvo, evitis, ke tiuj ĉi malplimultoj pluestos dorno en la karno de la naciismaj identec-formuladoj de la kristana plimulto. Tiu reiro okazis en la 50-aj

jaroj kaj la hebreoj de Zakko, de Gzire kaj de Reza'iyeh nun ankaŭ lingve eliris el la granda areo de la nov-aramea lingvo, kaj ili spertas malrapidan asimiliĝon en la lando, kiu ilin gastigas.

Serĉado de nacia identeco fare de aturoj trovas en religio katalizilon, kiu estas preterlasenda ĉe nereligia imago pri nacio; sed ĝi estas sendube pli grava ol la lingva aspekto de la afero. Ankaŭ lingvo, almenaŭ en Irano, estas markata per religiaj aspektoj. „Vi parolas kristane!“ Jen mira aserto de atura kunparolanto, kiun mi renkontis la unuan fojon en legomĝardeneto en la ĉirkaŭoj de Urmio. Tiu aserto certe ne estas omaĝo al miaj lingvaj konoj, sed atesto pri kerna aspekto de la atura vivo kaj kulturo. La kristana lingvo estas ĝuste ilia lingvo, tio estas la lingvo de kristanoj fronte al la lingvo de ŝijaj islamanoj. Sed, aliflanke, se oni diras ke aturoj estas tiuj, kiuj parolas la kristanan lingvon, ankaŭ tiam oni diras nur proksimuman veron. Temas pri aserto, kiu, eĉ se sinkretisme signifoplena, egaligas lingvon, etnon kaj religion.

2.

2.1. Indas, do, klopodi fiksi la nunan disecituacion per kunmetado de informoj, kiuj tamen estas partaj kaj foje kontraŭdiraj. Eĉ la demando: „Kiom estas aturoj?“ starigas grandajn nombradproblemojn.

2.2. La du plej grandaj loĝlokoj estas tiuj en Irako kaj Irano. Aturoj, komence loĝantaj en la montaraj partoj de Azerbajĝano kaj irana Kurdio, en la montaraj vilaĝoj de Tiari kaj de Akkari aŭ en la ĉirkaŭaĵoj de Mosulo, spertis alurbigon kaj, en la lastaj tempoj, elmigradon al Eŭropo kaj ĉefe al Usono kaj al Aŭstralio. Malgraŭ tio la loĝantoj de ĉi tiuj landopartoj plejparte loĝas apud la originaj loĝlokoj. Sed eĉ pri ili oni ne kapablas kunmeti certajn informojn.

En 1976 F. A. Penakjeti atribuis al la komunumo formata de aturoj nomataj „kaldeoj“ kaj „sirianoj“ („uniatoj“, kiuj estas iamaj respektive nestori-konfesiuloj kaj jakobit-konfesiuloj) kaj de irakaj jakobitoj grandecon de 200 000 homoj, sed la Amasa Kunveno pri Aturaj Rajtoj (Mass Meeting on Assyrian Rights), okazinta la 19-an de marto 1978-a zorge de Bet Naharain Democratic Party en Ĉikago, taksis la aturan komunumon en Irako je 1 000 000 da homoj.

Tial ke aturoj el irana Azerbajĝano kaj el turka Kurdio, elmigrantaj al Irako post la dua mondmilito (kiujn Penakjeti preteratentas en siaj kalkuloj) estas certe malplimultaj rilate la ceterajn irakajn aturojn, demografia pliiĝo je 250% dum unu jaro estas altgrade neverŝajna.

Konklude, la konfrontitaj ciferoj estas kontraŭdiraj; preskaŭ certe la nombroj indikitaj de Penakjeti estas pli verŝajnaj, sed en ĉi tiu kazo, kiel

en aliaj kazoj, oni sentas nepran bezonon pri pli akurata kontrolo.

Malpli komplikata estas la irana situacio. En Irano vivas proksimume 250 000 kristanoj. Se ni dekalkulus la multnombrian armenan komunumon (160 000 anoj) restas akceptebla nombro de 20 000/25 000 katolikaj kaldeoj (la popolnombro en Teherano ne estas kompleta kaj tio povas kuntreni diferencon pli grandan ol 1 000 homoj) kaj 13 500 aturoj de la orienta eklezio (tiu eklezio antaŭ la alveno de okcidentaj misiistoj estis nomita nostoria, sed tiu esprimo iĝis poste aĉiga).

Se oni konsideras ke ekzistas granda nombro da miksaĵoj geedziĝoj ene de la konfesioj kaj ke la cifero 250 000 por kristanoj en Irano estas rondigita supren laŭ ŝajno, nia kalkulo pli proksimas al la realo ol tiu pri la iraka komunumo.

La atura komunumo jakobit-konfesia loĝanta en Turkio, en la ĉirkaŭoj de Mardin kaj Midayt, kiun mi vizitis pasintoktobre, nun jam konsistas nur el malmultaj anoj en la urboj kaj el kelkaj malriĉaj vilaĝoj en la landinterno (proksimume 2 000 homoj).

Granda parto de tiuj ĉi aturoj elmigris al Svedujo.

2. 3. Jene malfermiĝas ĉapitro pri la diasporo, pri kiu oni devas fidi je la pres-organoj, kiuj ĝenerale estas malmulte precizaj.

Aturoj en Svedujo estus 8 000, el kiuj 1 500 rifuĝintaj el Libanujo laŭ Assyrian Sentinel, dum la irana Atur, numero 143-a, parolas pri 6 000, el kiuj 3 000 nur en Sodertalje. Tiuj ĉi enmigrintoj estis ĵuse envolvitaj en rasismo-okazintaĵoj.

Ankaŭ ĉi-kaze oni rajtas korekti la kalkulon per minus-ado inter la sumoj 8 000 kaj la 1 500 rifuĝintoj el Libano, kiujn Atur eble ne enkalkulis. Tiele oni havas diferencon de nur (?) 500 homoj.

En Londono vivas 1 500 aturoj, kiuj ĵus akiris propran kunvenejon, Bet-Aturaye, kiu estas, kiel aliaj samspecaj ejoj dissemataj tra la diasporo, centro por politika kuniĝo de la tiea komunumo.

Francujo gastigas ĉie, de Liono al Marsejo, malgrandajn aturajn kernojn. Temas precipe pri intelektuloj, kiuj havis siajn unuajn kontaktojn kun la franca kulturo tra la agado de la lazaranaj misiistoj en la ebenaĵo de Urmio.

Verŝajne en Ateno vivas, atendante vizon, proksimume 6 000 aturoj, intencantaj vojaĝi al pli riĉaj landoj, kiuj ofertus al ili laboreblecon. Tamen tie ekzistas ankaŭ greka, daŭre enloĝanta kaj organizita komunumo.

Male, mi ne kapablas nun doni informojn pri la atura komunumo loĝanta en soveta Azerbajĝano, kiu eble estas sufiĉe multnombra.

La influo de elmigrintaj komunumoj en la atura vivo estas proporcia ne nur al nombro, sed ankaŭ al ilia financa stato. Pro tio apartan aktivan rolon ludas la komunumoj loĝantaj en Aŭstralio kaj en Usono.

La unua konsistas el iom malpli ol 4 000 mem-

broj, kiuj dum la lastaj jaroj rimarkigas en ĉiam pli decida maniero sian ĉeeston, kiel la ne multnombra elmigrintaro en Federacia Respubliko Germanio, proksimume 5 000 homoj, kiu tamen restas ankoraŭ ne tre aktiva.

Usono gastigas pli ol 3 000 aturojn. La nombra forto kaj la riĉo de ĉi tiu komunumo igas ĝin ludi unuagradan funkcion pri kunligo inter la propraj spertoj kaj tiuj de aliaj landoj kaj igas ĝin pezi ne malmulte rilate la elektojn kaj iniciatojn de la Atura Universala Ligo.

Usonaj aturoj, komence migrintaj ĉefe al Detroit kiel ne kvalifikitaj laborantoj en la sektoro de aŭtomobila industrio kaj de transportoj, nun estas dissemataj iom tra la tuta teritorio de Usono. Foje ili surgrimpis sociajn tavolo-diferencojn ĝis sociaj kaj politikaj postenoj, ankaŭ ekster la propra komunumo, kiuj estas vere rimarkindaj.

La ĉeesto en Usono de la Patriarko de la Orienta Eklezio (nun jam de jarcentoj hereda titolo, kiu iras de onklo al nevo) konsistigas ne duarangan, kernecan pozicion de ĉi tiu komunumo.

La murdo de la lasta patriarko, Catholicos, antaŭ la nuna patriarko reliefigis, preter la bruoj pri la fakto mem, spurojn de ia centrecado de la atura problemo, kiujn oni taksis tute malaperintaj.

3.

3. 1. La socia organiziĝo de aturoj varias laŭ la riĉo de la komunumoj kaj politikaj reg-formoj en la gastigantaj landoj.

La tre disvastiĝinta asociaro estas tre multe disbranĉiĝinta. Ĝi estas unuigita per la Universala Ligo, kies sidejo estas en Genevo.

Oni trovas naciajn asociojn, junularajn asociojn, lokajn kaj urbajn komitatojn, kiuj kapablas produkti gazetojn kaj radio-elsendojn, kiel en Usono, kaj kvazaŭ-kaŝajn organizaĵojn, kiuj apogas sin al unu aŭ al alia religia komunumo.

La socia kaj kultura agado, en kiu partoprenas ankaŭ la maronitaj libanaj elmigrintaj komunumoj, baziĝas preskaŭ ĉie sur lernejoj por lernado de la origina lingvo, iniciatoj pri historia kaj historia-religia esplorado, aranĝado de civitanaj kaj ĉefe religiaj festoj.

3. 2. Por kapti kompleksecon kaj apartecojn oni devus reviziti la tutan historion landon post lando kaj urbon post urbo. La apartaĵoj de ĉiuj lokaj situacioj povas esti facile komprenataj se oni pensas, ke en maŝrekaj landoj aturoj estis aŭ estas en kontakto kun grandegaj fenomenoj, kiaj la libana gerilo, la kurda ribelo, la iranaj okazintaĵoj (por citi nur la lastajn fenomenojn), dum restas esplorindaj aturaj viv-manieroj ĉe kontaktoj kun la okcidenta industria civilizo aŭ en grandaj iranaj urboj.

Esploro pri aturoj pelas nin ĝuste al akiro de tiuj ĉi specifajoj, en la espero de ebla pentrado de kompleta bildo, kiu favoru la rezisto-kaj kuniĝo-procezojn de ĉi tiu popolo.

Tradukis: Renato Korseti

REDAKTA KOMITATO

Violin Oljanov (Bulgario) — ĉefredaktoro
Nikola Aleksiev (Bulgario)
D-ro Detlev Blanke (GDR)
André Cherpillod (Francio)
Kimiaki Kurita (Japanio)
William Gilbert (Francio)
Bolek Staszczak (Pollando)
Oldrich Knichal (ĈSSR)
Lingva revizio Asen Grigorov (Bulgario)
Arta aranĝo: Kiril Draĵev (Bulgario)

La redakcio atendas kontribuojn de pacamikoj el la tuta mondo. Ju pli da kunlaborantoj, des pli varia kaj interesa revuo. Sendu la materialojn prefere tajpitaj aŭ tre klare mane skribitaj kun interlinia spaco kaj margeno, sur grandaj folioj de kancelaria formato. La redakcio akceptas nur originalan (unuan) ekzempleron de la tajpaĵo. Kopioj estas lasataj sen konsidero. Skribu tre klare viajn nomojn kaj adresojn en nacia lingvo! La redakcio ne resendas neuzitajn materialojn.

KIEN SKRIBI

Honora prezidanto: Nikola Aleksiev, str. Nezabravka 1, vhod 2, 1113 SOFIA, Bulgario.

Prezidanto: D-ro Pethes Imre, H-1940, BUDAPEST VI, Nepköztársaság utja 73, Hungario.

Vicprezidantoj: D-ro Magomet Isaev, prosp. Kalinina 14, MOSKVA K-9, USSR.

Glady Claude, 21 rue Kessels, B-1030 BRUSSEL, Belgio.

Generala sekretario: William Gilbert, 30, rue Croix-Montoire, 37100 TOURS, Francio.

Sekretarioj: Syozi Nanba, Huruiti 3-13-26, Ziôtô-ku OSAKA, Japanio.

Ing. Angel Todorov, bulv. Emil Markov, blok 37, II, 1404 SOFIA, Bulgario.

Gefredaktoro: Violin Oljanov, str. Bojanski Vodopad 241.E, 1404 SOFIA, Bulgario.

Centra administrantino: Vasja Petrova, Bulgara MEM-KOMITATO, bulv. Hristo Botev 97, 1303 SOFIA, Bulgario.

Centra kasisto (por la okcidentaj landoj): Pierre Jouvin, 14 rue Thiers, 76120 GRAND QUÉVILLY, Francio (Poŝtkonto CCR — Rouen 102—45 P.)

Respondeculo pri landaj numeroj de „PACO“: Helmut Fuchs, Hohe Str. 33, DR-83, PIRNA, Germana DR.

Aŭstralio: N. A. Collier, 7 Monomeeth St. BUDERIM QId. 4556.

Aŭstrio: Ernesto Quietensky, Pappenheimgasse 70/3/12 A—1200 WIEN Aŭ S.100.

Belgio: Glady Claude, 21 Rue Kessels, 1030 BRUSSEL.
Britio: Paul Hewitt, Laycroft, Main Road, COVENHAM Louth, Lincs, LN11, OPF.

Bulgario: Bulgara MEM-KOMITATO, bulv. Hristo Botev 97, 1303 SOFIA 31 levoj.

Ĉeĥoslovakio: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, MEM-Sekcio, Jilska 10, 110 00 PRAHA 10, 30 kronoj.

Danlando: Egon Starup, Brovaenget 26, DK-2700, KOBENHAVN BRH.

F. R. Germanio: Roland H. Hegen, Iggelbach, Schlossgasse 30, D-6731 ELMSTEIN 2. 12 DM.

Finnlando: Erkki Järvinen, Ukonkivenpolku 2—1—68, 01610 VANTAA 61.

Francio: Roger Degrelle, 11 Cours Léopold, 54042 NANCY-CEDEX (pĝk. 771.77.R) 40 fr. fr

Germana Demokratia Respubliko: Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de GDR, Charlottenstr. 60, 108 BERLIN 10 DM.

Hispanio: Luis Serrano Perez, Font Nova 32, SABADELL (Barcelona).

Hungario: Hungara MEM-KOMITATO, H-1368 BUDAPEST 5, pf. 193. 36 forintoj.

Italio: Riccardo Pinori, V, le Ghisleri 9/15, I-00176 ROMA (p. g. k. 64882004).

Japanio: Kurita Kimiaki, 1209—98 Sakuragaoka, YATA MISIMA, 411 (Japana Pacdefenda Esperantista Asocio).

Jugoslavio: Dim Bjelanović, Zahumska 23 b, BEOGRAD-DOBRINJSKA 12.

Kubo: Rufino López, Havana Esp.-Rondo, Poŝkesto 314, HABANA 1.

Norvegio: Olaf Reiersol, Buerstad, N-3135 TOROD.

Okcidenta Berlino: Manfred Kossolobov, 1 BERLIN, Topiauer-Allee 2.

Pollando: RUCH — WARSZAWA.

Portugaliao: Portugala E-Asocio, Rua Dr. João Couto 6 R/C A-LISBOA 350 escudo.

Rumanio: Cosma Dorin, Muzicescu 26, sc. C., ap. 11, R-1900 TIMIȘOARA.

Socialisma Respubliko Vjetnamio: Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 107 Quan Thanh, HANOJ.

Sovetunio: Unuiĝo de sovetaĵoj pri amikecaj kaj kulturaj rilatoj kun aliaj landoj, prosp. Kalinina 14 MOSKVA K-9. 1,80 rubloj.

Svedio: Tomas Jansson, Våktargatan 26 D, S-754 22, UPPSALA.

Usono: James Deer, 11905, SW Settler Way, BEAVERTON Or. 97005. dol. 6,50

Aliaj landoj: Bv. turni vin al unu el la ĉi-supraj adresoj, aŭ al Pierre Jouvin (centra kasisto — vd. maldekstre).

GRAVE!

Abonpagojn el socialismaj landoj sendu al 1303 SOFIA, bulv. Hristo Botev 97 (por „Paco“). El nesocialismaj landoj — al la adreso de la Centra kasisto — 40 fr. fr.